The

BRITISH ESPERANTIST.

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION.

Vol° XVI. N-RO 181.

JANUARO, 1920.

Prezo 4 Pencoj. AFRANKITE

Paĝo.

KOST	0	DE	AB	ONO	En	Britujo,	afrankite:	por
unu jaro,	5	ŝilin	goj	unu	numer	o, 5 pend	oj.	3

Eksterlande, afrankite: por unu jaro, 5 ŝilingoj per poŝtmandato aŭ respond-kuponoj.

Abonoj estas akceptataj ĉe la komenciĝo de ĉiu monato. Sin turni al la Sekretario, 17, Hart-street, London, W.C.1.

REDAKCIO.—Manuskriptojn, k.t.p., oni volu sendi al la Redakcio, 17, Hart-street, London, W.C.1. Tradukintoj antaŭ ol sendi siajn verkojn volu ĉiam certiĝi, se necese, ĉu la aŭtoro aŭ la originalaj eldonintoj permesas la represigon.

Pri artikoloj la Redakcio rezervas al si la rajton korekti la erarojn de stilo, k.t.p. Ordinare oni ne resendas artikolojn neakceptitajn.

ANONCOJ.—Pri anoncoj, sin turni al la Direkcio, THE BRITISH ESPERANTIST, 17, Hart-street, W.C.1 .-Privataj anoncoj pri Esperantistaj naskiĝoj kaj edziĝoj estas enpresataj po 3 ŝilingoj por kvar linioj.

ENHAVO

La Biblio en Esperanto	***	***	1
Rakontoj el la Biblio, D-ro L. L. ZAMEN	HOF	••••	2
La Dormanta Belulino (por la infanoj), Lo	ouise B	RIGGS	3
Esperanto in Yorkshire, JOHN MERCHAN	NT	***	6
Competition for Boys and Girls	***		8
Anekdotoj		7 8	k 8
Letero el Londono. P. BLAISE			9
Esperantista Konferenco en Parizo			10
Dek-dua Universala Kongreso			12
Chronicle-Coming Events			12
Alvokoj	•••	11 &	14
UEA en Londono			14
Dek-unua Kongreso de Britaj Esperanti	stoj		14
Libraro kaj Gazetaro			15
B.E.A., Donations to		•••	15
B.E.A. Candidates for Membership, N	ew Fe	llow,	
Examinations, Council Meeting, Not	ices F	.K.I.	16

TRE FELIĈAN, PROSPERAN NOVJARON AL ĈIU LEGANTO!

La Biblio en Esperanto.

LA BIBLIA KOMITATO ESPERANTISTA, kies prezidanto estas Pastro J. Cyprian Rust, ĵus ricevis el Varsovio la finan parton de la manuskriptoj de D-ro Zamenhof, enhavantaj lian tradukon de la Malnova Testamento. Nuntempe, laŭ la deziro de la eldonontoj-BRITA KAJ ALILANDA BIBLIA SOCIETO, kaj NACIA BIBLIA SOCIETO SKOTA—la komitato zorge tralegas kaj revizias la tekstojn (forigante skriberarojn), antaŭ ol presigi la libron. Por kontentigi la ĝeneralan deziron, ricevi baldaŭ tiun plej gravan verkon de D-ro Zamenhof, la Komitato faros sian eblon rapidigi ĝian eldonadon; sed, pro la grandeco de la laboro kaj la malmultnombreco de la reviziantaro, oni ne povas esperi la finan aprobadon de la presprovaĵoj antaŭ la fino de 1920.

Car restas farota multo da reviziado, oni petas la kunhelpon de aliaj samideanoj (Kristanoj britaj), kiuj scias la hebrean lingvon. Ciu, kiu povas tiamaniere kunlabori, bonvolu skribi al la sekretario (adreso sube).

Jam multaj Esperantistoj deziras vidi eltiraĵojn el la ankoraŭ neaperintaj tradukoj de la Majstro, la Komitato kun plezuro konsentis, ke THE BRITISH ESPERANTIST aperigu kelkajn el la interesaj rakontoj en la Biblio; kaj tiujn redaktis S-ro W. M. Page en literatura formo. La unua aperas sur la sekvanta paĝo.

La Komitato ankoraŭ ne decidis, ĉu la libroj de la Biblio estos dividitaj laŭ versoj (kiel en la tradukoj de D-ro Zamenhof), aŭ laŭ paragrafoj (kiel en la angla Reviziita Traduko). Tio dependos, interalie, de la kosto de papero kaj presado; sed oni volus ricevi la opiniojn de legantoj de B.E.

J. M. WARDEN, sek., Biblia Komitato Esp-a, 28, St. Andrew Square, Edinburgo.

Rakontoj el la Biblio

tradukitaj de D-ro L. L. ZAMENHOF.

(redaktitaj laŭ la afabla permeso de la Biblia Komitato Esperantista).

I. La Falo de Jeriĥo.

Kaj okazis, ke kiam Josuo estis apud Jeriĥo, levis siajn okulojn, kaj ekvidis, ke jen viro staras antaŭ li kaj en sia mano li tenas nudigitan glavon.

Kaj Josuo aliris al li, kaj diris al li:

— Cu vi estas nia aŭ ĉu el niaj malamikoj ?

Kaj tiu diris:

— Ne, mi estas militestro de la Eternulo, mi nun venis.

Tiam Josuo ĵetis sin vizaĝaltere kaj faris

adoron, kaj diris al li:

— Kion mia sinjoro diros al sia sklavo? Kaj la militestro de la Eternulo diris al Josuo:

— Demetu vian ŝuon de viaj piedoj, ĉar la loko, sur kiu vi staras, estas sankta.

Kaj Josuo faris tiel.

Kaj Jeriho estis fermita kaj ŝlosita kontraŭ la Izraelidoj; neniu eliris, kaj neniu eniris.

Kaj la Eternulo diris al Josuo:

Vidu, Mi transdonis en vian manon Jerihon kaj ĝian reĝon kaj fortajn militistojn. Ĉirkaŭiru la urbon ĉiuj militistoj, ĉirkaŭiru la urbon unu fojon; tiel faru dum ses tagoj. Kaj sep pastroj portu sep trumpetojn jubileajn antaŭ la kesto, kaj en la sepa tago ĉirkaŭiru la urbon sep fojojn, kaj la pastroj sonigu per la trumpetoj. Kaj kiam oni ektrumpetos per la jubilea korno kaj vi ekaŭdos la sonadon de la trumpeto, tiam la tuta popolo ekkriu per laŭta voĉo; kaj la muro de la urbo falos malsupren, kaj la popolo eniru, ĉiu rekte antaŭen.

Kaj Josuo, filo de Nun, alvokis la pastrojn,

kaj diris al ili:

— Portu la keston de interligo, kaj sep pastroj portu sep jubileajn trumpetojn antaŭ la kesto de la Eternulo.

Kaj li diris al la popolo:

- Iru kaj ĉirkaŭiru la urbon, kaj la armitoj

preteriru antaŭ la kesto de la Eternulo.

Kaj post kiam Josuo tion diris al la popolo, sep pastroj, portantaj sep jubileajn trumpetojn antaŭ la Eternulo, ekiris kaj ektrumpetis per la trumpetoj, kaj la kesto de la interligo de la Eternulo iris post ili. Kaj la armitoj iris antaŭ la pastroj, kiuj trumpetis per la trumpetoj, kaj la resto de la popolo iris post la kesto; oni iris kaj trumpetis per trumpetoj.

Kaj al la popolo Josuo ordonis, dirante:

— Ne kriu, kaj ne aŭdigu vian voĉon, kaj neniu vorto eliru el via buŝo ĝis la tago, kiam mi diros al vi, ke vi kriu; tiam vi krios.

Kaj la kesto de la Eternulo ekiris ĉirkaŭ la urbo, ĉirkaŭiris ĝin unu fojon; kaj ili venis en la tendaron, kaj tranoktis en la tendaro.

Kaj Josuo leviĝis frue matene, kaj la pastroj ekportis la keston de la Eternulo. Kaj la sep pastroj, kiuj portis sep jubileajn trumpetojn antaŭ la kesto de la Eternulo, iris kaj senĉese trumpetis per la trumpetoj; kaj la armitoj iris antaŭ ili, kaj la resto de la popolo iris post la kesto de la Eternulo, kaj oni senĉese trumpetis per trumpetoj. Kaj ili ĉirkaŭiris la urbon en la dua tago unu fojon, kaj revenis en la tendaron.

Tiel oni faris dum ses tagoj.

En la sepa tago ili leviĝis frue, kiam montriĝis la matena ĉielruĝo, kaj ili ĉirkaŭiris la urbon en la sama maniero sep fojojn; en tiu sola tago ili ĉirkaŭiris la urbon sep fojojn.

Kaj ĉe la sepa fojo, kiam la pastroj trumpetis per la trumpetoj, Josuo diris al la popolo:

— Ekkriu, ĉar la Eternulo transdonis al vi

la urbon . . .

Kaj la popolo ekkriis, kaj oni ektrumpetis per trumpetoj. Kaj kiam la popolo ekaŭdis la sonadon de la trumpeto, la popolo ekkriis per laŭta voĉo; kaj la muro falis malsupren, kaj la popolo eniris en la urbon, ĉiu rekte antaŭen, kaj ili prenis la urbon. Kaj la urbon oni forbruligis per fajro, kaj ĉion, kio estis de ĝi; nur la arĝenton kaj oron, kaj la kuprajn kaj ferajn vazojn, oni donis en la trezorejon de la domo de la Eternulo.

(Ciuj rajtoj rezervitaj.)

La Biblio.

Mi opinias, ke estas plej necese, ke ni kiel eble plej baldaŭ posedu bonan tradukon de la tuta Biblio. Kian ajn vidpunkton ĉiu el ni aparte havas pri aferoj religiaj, neniu (eĉ plej granda malamiko de ĉia religio) povas nei, ke el la tuta ĝisnuna literaturo de la homaro la plej grava verko sendube estas la Biblio kaj posedi ĝin en bona esperanta traduko estas por ni afero eksterordinare grava. La ĉefaj kaŭzoj de tiu graveco estas:—

 Neniu libro estas tiel konata en la tuta civilizita mondo, kiel la Biblio, kaj se ni povus

Sekvo sur pg. 5.

La Dormanta Belulino.

Teatraĵeto por la Infanoj.

En Tri Aktoj.

Personaro:

Reĝo. Reĝino. Princino. Princo.

Infanistino. Feino de Vivo.

Volaĉo (malbona feino).

Feinoj: de Beleco, Riĉeco, Saneco, Intelekto, kaj Bonhumoro.

Korteganoj.

AKTO I.-La Baptofesto.

Cambro en la palaco. Eniras Infanistino, portante infaneton.

Inf.: Nu, mia belulineto, vi estas tute preta por la baptofesto. (Metas infaneton en lulilon. Kantas laŭ ario—" La Vespera Himno.")

> Dormu dolĉe, belulino; En lulil' ripozu vi. For de vi malbono restu! Vian dormon gardas mi.

(Eniras Reĝo, Reĝino, kaj Korteganoj.) Reĝo: Nu, Amelio, kiel fartas la infaneto?

Inf.: Via Reĝa Moŝto, la Princino estas tiel sana, kiel bela.

Reĝo: Donu ŝin al mi. Ha, kiel bela! (al Reĝino.) Ĉu vi ne opinias, mia kara, ke ŝi tre similas al la patro?

Reĝino: Ŝi havas vian nazon, sed, feliĉe, miajn okulojn. La dolĉulineto! Ĉu vi invitis la feinojn al la baptofesto?

Reĝo: Ciun el ili, krom Volaĉo. Vi ne deziris, ke mi invitu ŝin.

Reĝino: Certe ne. Jen venas la feinoj.

(Eniras Feinoj.)

Feinoj: Saluton al vi, Gereĝoj! Ni venas por fari niajn donacojn al via filineto.

(Ciu feino siavice svingas bastonon super la lulilo.)

F. de Beleco: Mi donacas al vi la Belecon. La viaj estu brilaj bluaj okuloj, orflavaj harbukloj, kaj ĉiaj belaj trajtoj!

F. de Riĉeco: Mia donaco estas la Riĉeco. Oro, arĝento, kaj juveloj estu viaj dum la tuta vivo!

F. de Saneco: Mi alportas pli bonan donacon ol tiun. La Saneco feliĉigu kaj fortigu vin! Forrestu de vi morbilo, urlio, kapdoloro, dentdoloro, kaj stomakdoloro!

F. de Intelekto: Al vi mi donacas fortan Intelekton. Nenia leciono plorigu vin! De A B C ĝis ĉiaj 'onomioj kaj 'ologioj, vi venku ĉiun!

F. de Bonhumoro: Ho, mia kara, ĉiuj donacoj estus kvazaŭ nenio sen la mia. Mi donacas al vi la Bonhumoron, per kiu vi gajnos ĉies admiron kaj amon de lulilo ĝis tombo.

Reĝo: Koregan dankon, feinoj. Vere mia infaneto fariĝos la plej feliĉa sinjorino en la tuta mondo.

Volaĉo (enirante): Ĉu vere, Via Reĝa Moŝto? Mi kredas, ke ne.

Ciuj (en konsterno.): Volaĉo! Jen Volaĉo! Vol.: Kial vi ne invitis min al la baptofesto? Reĝ (hezite): Ho... mi perdis la adreson.

Vol.: Tre kredebla tio! Donu al mi tiun infaneton. (Eltiras ĝin el la lulilo kaj skuas ĝin.) Nu, vi bela, riĉa, sana, intelekta, bonhumora princino, mi jam faris mian donacon!

Reĝino: Ho, savu ŝin! Deprenu ŝin de tiu monstro!

Reĝo: Trankviliĝu, kara mia! Ne incitu ŝin. Ŝi ne povas fari ian malbonon; ŝi ne povas depreni ian ricevitan donacon.

Vol.: Ha, ha! Tio estas vera. Sed mi faros laŭeble. Ho princino tiel bonsorta, kiam vi atingos la aĝon de dek sep jaroj, vi pikos al vi la fingron per bobenakso de ŝpinilo, kaj— VI Mortos!

Ĉiuj: Ho ve! ho ve! he ve!

F. de Vivo (enirante): Ne tiel rapidu, mi petas Jen mia vico! Mi min kaŝis ĝis nun, ĉar mi suspektis malbonon. Kuraĝu, Gereĝoj! Mi ne povas tute malfari la sorĉon de tiu malbonulino, sed ion mi povas fari. Anstataŭ morti, la princino dormados dum cent jaroj, kaj estos vekita nur per la kiso de bela Princo.

Reĝo: Ho ve! Kiel tio helpos al ni? Ni ne ĉeestos, kiam ŝi vekiĝos.

F. de Vivo: Restu trankvila! Ankaŭ al ĉiuj en la palaco venos dormo profunda, kaj ili vekiĝos nur tiam, kiam estos vekita la Princino.

Reĝo: Nu, mi ŝatas dormeton post tagmanĝo, sed cent jarojn—tio estas iom pli ol sufiĉa! Voku la heroldojn! Sendu proklamon en ĉiun parton de la lando, ke ĉiu ŝpinilo estu tuj detruita. Neniu faru, neniu posedu ŝpinilon dum venontaj dek sep jaroj! Obeu, aŭ mortu.

Акто II. (Post 17 jaroj.) La Naskiĝtaga Festo.

Sceno 1.—Ĉambro en la Palaco. La Princino kaj Korteganinoj kundancas. Eniras Reĝo kaj Reĝino.

Reĝino: Nu, miaj karaj, ne dancu plu. Restas multe por fari, antaŭ ol ni estos pretaj por la festo. Iru al viaj taskoj. (Korteganinoj foriras.)

Princino: Ho, Doroteo, restu por ludi kun mi. Doroteo: Ne, Via Moŝto, mi devas aranĝi la

florojn.

Princino: Do Lucio, vi restu.

Lucio: Ne, Princino, mi devas viziti la kuirejon.

Pr.: Vi do, Heleno.

Hel.: Mi devas konstati, ke viaj roboj estas tute pretaj por la festo.

Pr.: Patrino, restu kaj parolu kun mi.

Reĝino: Ne, karulino. Mi devas havi mian kutiman manĝeton de pano kaj mielo, kaj poste mi iom dormetos, por ke mi estu tute vigla je tiu ĉi granda okazo.

Pr.: Paĉjo, ĉu vi bonvolos ludi bilardon kun mi? Reĝo: Poste, poste! Mi nun devas kalkuli

la monerojn en mia kaso.

Pr.: Ili ĉiuj foriris—mi mem devas min amuzi. Sed kiel? Mi esploros la tutan palacon por trovi kunludanton.

Sceno 2.—Mansardo. Volaĉo, alivestita kiel maljunulino, sidas ĉe ŝpinilo.



(Rompas fadenon.)

Eniras Princino.

Pr.: Ho, kia stranga loko! Mi neniam antaŭe venis ĉi tien. Supren, supren, supren, sur tiom da ŝtupoj! Kaj kiu estas vi?

Vol.: Mi estas maljunulino, kiu multajn jarojn loĝadis en tiu ĉi mansardo laŭ la bonvolo

de Lia Reĝa Moŝto.

Pr.: Kaj kio estas tio? Ĝi aspektas tre stranga.

Vol.: Tio estas ŝpinilo.

Pr.: Ŝpinilo! Mi legis pri tio en mia libro de antikva historio, sed oni diris al mi, ke nuntempe ne ekzistas tio. Montru al mi, kiel ĝi funkcias.

(Vol. ŝpinas, kantante unuan strofon de antaŭa

kanto.)

Pr.: Ho, kiel admirinde! Permesu, ke mi provu. Mi estas certa, ke mi povas fari ĝin.

Vol.: Kun la plej granda plezuro, Princino.

(La Princino sidiĝas, ŝpinas, pikas la fingron, kriegas, kaj falas teren.)

Vol.: Ha, ha, ha! Jen mia venĝo, ho Via Reĝa Moŝto! Sceno 3.—La kortego. La Reĝo sidas ĉe tablo, kalkulante monerojn; la Reĝino manĝas panon kaj mielon; la Korteganoj (bilde pozigitaj) kudras, interparolas, kverelas.

Reĝo: Unu, du, tri, kvar spesmiloj.

Reĝino: Tiu ĉi mielo estas tre bongusta.

ia Kort.: Jes, mia kara, mi certigas vin—li ja
diris—(flustras.)

2a Kort.: Ĉu vi opinias, ke tiu rubando estas sufiĉe longa?

3a Kort.: Foriru, vi ĉagrena knabino, mi frapos al vi la vangon.

(Kriego ekstere. Ĉiuj tuj fariĝas senmovaj en karakterizaj pozoj. Eniras Feinoj, portante Princinon sur kanapo.)

Feinoj (kantas):

Dolĉe dormu, ho Princino, Ĝis la hor' fiksita, Kiam de la bela Princ' Estos vi vekita.

Reĝ', Reĝino, Korteganoj, Dormu vi profunde, Gis la venkon gajnos li Plene kaj senvunde. Arbarego nun aperu Cirkaŭ la palaco, Sirmu ĉiujn tie ĉi Kontraŭ sorĉminaco. Jaroj cent rapide pasu; Venu ĝoja horo; Kunvivadu Princ', Princin' Kun pac' kaj am' en koro.

AKTO III. (Post 100 jaroj) La Revekiĝo. Sceno I.—La Arbaro. Eniras la Princo.

Princo: Jen la arbaro de miaj sonĝoj, kaj tra la densejo mi vidas la palacon, en kiu kuŝas la belulino de mi serĉata. (Hakas dekstre kaj maldekstre.) Ho ve, ho ve, je ĉiu hako aperas nova branĉo! Tiu ĉi arbaro estas ensorĉita. Kion ajn mi faros?

(Eniras Volaĉo.)

Vol.: Ha, ha, stultulo! Haku, hakadu! eluzu vian forton! Neniam vi venkos. Princo: Ĉu neniam? Do neniam mi ĉesos penadi. Mi mortos penante.

(Hakadas vigle. Eniras F. de Vivo.) F. de Vivo: Kara Princo, vi noble faras.

Prenu tiun ĉi hakilon; per ĝi vi povos venki.

(Eliras.)

Princo: Koregan dankon al vi, spirito afabla! (Hakas.) Ha, ha, la arboj falas, falas! Jen, jen vojeto! Tre baldaŭ mi ekvidos la adoratinon. (Eliras hakante.)

Sceno 2.—La Kortego. Ciuj en pozoj same kiel antaŭe. Eniras la Princo.

Fine mi alvenas. Kiel strange! Araneaĵoj ĉie! Ce la pordo staras lakeo, dormante. Sur la ŝtuparo laboristoj kvazaŭ metas tapiŝon, dormante. En angulo paĝio kisas servistinon, dormante. Kion ni havas tie ĉi? (Skuas la Reĝon.) Vekiĝu, bonulo, aŭ ŝtelisto forprenos la monon! (Riverencas al Reĝino.) Sinjorino, ne restu pli longe kun malfermita buŝo, aŭ la araneoj eniros. (Al Kort.) Nu rapidu! Frapu! Mi estas certa, ke ŝi meritas tion. Ho vekiĝu, ĉiuj vi! mi deziras bonvenigon. (Ekvidas Princinon.) Ho jen, jen la vizio de miaj sonĝoj! Si ankaŭ dormadas. Mia ĉarma, bela, adorinda fraŭlino, vekiĝu! (Kisas ŝin. Ĉiuj vekiĝas.)

Reĝo: Kvin, ses, sep, ok spesmiloj. (Oscedas.) Reĝino: La mielo estas iom mucida. (Oscedas.) 1a Kort.—La rubando ja estas sufiĉe longa.

(Oscedas.)

2a Kort: Ho, malbona knabino! (Frapas kunulinon.)

Reĝo: Kiu estas vi, kaj kiel vi kuraĝas eniri mian palacon sen invito?

Reĝino: Eĉ se invitita, vi alvenas tro frue. Ankoraŭ ne estas la horo de la festo.

Princino: Ne riproĉu lin, patrino. Li estas bonvena, kiam ajn li venas.

Reĝo: Eble estas pli malfrue, ol mi kredis. Mi sentas min, kvazaŭ mi iom dormetis. (Oscedas.)

Reĝino: Ankaŭ mi. (Ĉiuj oscedas. Eniras Feinoj.)

F. de Vivo: Jes, Viaj Reĝaj Moŝtoj, vi iom dormetis. La horo fiksita por la festo jam pasis antaŭ cent jaroj.

Ciuj.: Cent jaroj!

Reĝino: Mi ja diris, ke la mielo estas mucida. F. de Vivo: — kaj nur restas, ke vi ŝanĝu ĝin en edziĝan feston, kaj donu vian benon al tiu feliĉa paro.

Reĝo: Sed mi ne konas la junulon—mi devas konsideri—prokrasti—

Princo: Kio! plua prokrasto! post cent jaroj!

Reĝino (flanken al Reĝo.): Ho ne, ne! Konsentu tuj. Cu vi kredas, ke oni facile trovos edzon por fraŭlino, kiu jam havas la aĝon de cent dek sep jaroj?

Reĝo: Nu, en tiu okazo, mi konsentas. Estu

benataj, miaj infanoj!

La Feinoj: Vivu la Dorminta Belulino kaj ŝia Amanta Princo!

Louise Briggs.

Sekvas de pĝ. 2.

montri al la mondo, ke Esperanto posedas la tradukon de la tuta Biblio, tio estas por ni tre

potenca propagandilo.

2. Por la plimulto de la nuntempaj kulturaj lingvoj la Biblio estas la ĉefa bazo, sur kiu la lingvoj literaturiĝis kaj disvolviĝis; tial ankaŭ por nia lingvo sendube estos tre grave, se ĝi posedos en si en plena tuteco tiun bazon kun ĝiaj multaj vortoj kaj esprimoj, kiuj fariĝis elementa necesaĵo por ĉiu nuntempa kultura lingvo.

3. Car ĉiu povas tre facile havi la tradukon de la Biblio en sia nacia lingvo kaj komparadi ĝin kun la traduko esperanta, tial por ĉiuj popoloj de la mondo la esperanta traduko de la Biblio povas esti tre oportuna kaj bona rimedo, por facile kaj fundamente ellerni Esperanton, rimedo precipe grava por tiuj multaj popoloj aŭ popoletoj, kiuj ne havas ankoraŭ tute bonajn kaj fidindajn lernolibrojn de nia lingvo.

EL Antaŭparolo de la Tradukinto.

Esperanto in Yorkshire.

Keighley was the cradle of the Esperanto movement in Great Britain, and Joseph Rhodes was its fairy Godfather. This was a wise choice in a twofold sense. Yorkshiremen are adversely criticised at times by envious folk, but none has yet denied their ability to keep a tight hold of a good thing. The Yorkshire tyke has a powerful bite, and never loosens its grip until victory is secured. History is replete with examples of this in science, sport and battle; the White Rose symbolises tenacity of purpose with the will to succeed.

Esperanto was fortunate in getting its young and tender roots implanted on fruitful Yorkshire soil by a typical, stick-it-ical, never-givein-ical tyke. Joseph Rhodes planted the seed, but John Ellis helped with the spade. The latter is rarely heard of nowadays,* but his voice and pen did great deeds in the days when the labourers were few. A warm welcome awaits his return to the limelight, whenever he decides to come amongst us again. Of the ceaseless service of Joseph Rhodes it is difficult to write. He does not blow hot and then cold; he is not a fervid enthusiast one day, and a damping pessimist the next, but plods along at the same even pace, taking obstacles in his stride, and ever nearing the goal with unfaltering steps. For 17 years he has fought bravely and brilliantly for the cause, and will for all time stand out as a shining example to us all. His great ability, splendid courage, and unfailing courtesy have won for him the admiration and esteem of Esperantists the world over.

The Keighley Society was founded in November, 1902, and has always been a force in the county; to-day it is guided by F. C. Rhodes, who is a secretary and instructor of outstanding merit. It has a growing membership, and the following classes speak eloquently of the work which is being done: Technical School, 24 students; Haworth Council School, 15 students; Holycroft Council Day School, 64 students. May the glory of Keighley never grow less!

HUDDERSFIELD was the second Yorkshire town to form a group, but it only lasted from November, 1903, to May, 1905. G. H. Taylor was the secretary and tried his best to keep things going; but they went! In 1907, W. H. Hirst came to the rescue. (Rhodes and Hirst; Hirst and Rhodes! How these names crop up in Yorkshire's doings!) He resusci-

tated the society, and to-day it is in the very front rank. Its lady members are famous talkers, and some of them very capable actresses. It has splendid workers in Miss Morton and W. H. Hirst and J. H. Fitton, whilst other well-known members are Mrs. Roberts (née Cotton), and Misses Fielding, Gee and Beaumont. If ever the B.E.A. holds a Congress in Huddersfield, a glorious success can be assured.

In 1904, LEEDs came into the picture, and soon took up a position in the foreground, thanks largely to Professor Maréchal, an eloquent orator and a fine propagandist, aided by T. Hoskison and A. C. Poiré. All three gentlemen seem to have passed out of the work, but why, I do not know. At present the chief pillars are Miss L. Briggs—a host in herself, and Messrs. H. Blakey, Waddington and Gregory, with many others of equal enthusiasm and energy. Leeds had the honour of entertaining the B.E.A. Congress in 1909, and the pages of the "B.E." are eloquent regarding the success of the visit.

Close upon the heels of Leeds came Sheffield, where two Groups were formed in the same year, and both are still doing a very useful work. The B.E.A. visited the city in 1914, and here again Yorkshire scored splendidly, thanks chiefly to glorious weather, and good organisation by the congress secretaries, Norman Roberts and W. Hagen. The movement has invaluable friends in M. Pearson, E. F. Rodger, Mrs. Waller, G. W. Roome had J. Bateman, all of whom have given years of loyal and untiring service. The Society is stronger to-day than ever, and has many classes in active operation in different schools and institutions.

Harrogate, under the control of R. H. Swainson,* used to be a splendid society, but is scarcely so robust to-day. Still, there is a small band of enthusiasts in this beautiful inland spa, and one may look forward to increased activity in the near future. We are all thirsting to drink the waters there again! Hull was once a word to conjure with, for when Major Richworth was in command there were over 200 Esperantists in the "land of green ginger," and to-day, alas, the town does not even possess a group. Surely there is enough dormant enthusiasm in the Third Port to remedy the deficiency. Formerly, active groups were also in existence in Pudsey,

^{*} Nevertheless, he is still doing good unobtrusive work on the Examinations Board of B.E.—(Ed. B.E.).

^{*} Now Secretary of the London District, National Council, Y.M.C.A.—(Ed. B.E.).

BATLEY, SHIPLEY (where the lamented Ed. Parker was secretary), OAKWORTH, CASTLEFORD, DEWSBURY and MIRFIELD, but the war has placed them hors-de-combat for the moment. TODMORTON can boast an energetic little society, with a splendid secretary in F. Gibson, and a very keen membership. If one were to judge by appearances alone, it might seem that Esperanto is progressing crabwise in Yorkshire, seeing we had 18 groups prior to the war, and only to to-day, but reports show that the movement is making a real advance all along the line, and that the "big push" is about to take place. Take HALIFAX as an example; there we had a capital group, under the care of Miss Slade, but it fell sick and died. To-day the seed is again springing through the ground, for our old friend, F. W. Duckitt, has gathered around him such splendid workers as Messrs. Kiek, Greenwood, Whitehead, Boothman and Hoyle, and unless I am greatly mistaken, they will soon cull a garland of success which will gladden all our hearts.

The SPEN VALLEY group is also going ahead with vigour, with H. Brooke as commander-in-chief, and L. Blackburn, Mrs. A. Wright, and F. Wright as aide-de-camp. The sun does not always shine in the valleys, but the Star of Hope is ever present to guide us to victory,

Wakefield is sadly in need of a society to take the place of the one that bloomed in splendour but never ripened into fruit. The Y.E.F. might well devote its attention to such important centres as this, with a view to groups being established.

York, the ancient capital of Britain, is but a new comer in the Esperanto world, but it is a particularly healthy recruit. W. F. Lawrence initiated the society, and has done yeoman service since its foundation in 1914. Alderman J. B. Inglis was instrumental in obtaining official recognition from the Lord Mayor and City Council, when the B.E.A. Congress was held there in 1916, whilst other powerful supporters are L. H. Leadley, B.A., F. Thurgood and the Rev. G. C. Beach, M.A. The arrangements which were made for the congress were admirable in every respect, although the weather was so inclement that all of us will have cold feet when we die!

I have left Bradford to the last, because, like the solo pianists, I like to strike a triumphant note as a grand finale. I believe Mr. Whitaker was the first pioneer in Bradford, and he did a great work in the early days of the society's history. To-day, as for years past that typical hard-headed Yorkshireman, J. T. Holmes, and A. Tuke Priestman, appear

to be the chief stalwarts, and they, with the assistance of many willing workers, have built up a very strong and successful society. Their social gatherings are full of life and gaiety and the Y.E.F. takes care to visit this hospitable

society at least annually. The Y.E.F. is a strong organisation, and with Joseph Rhodes as president and Miss C. M. E. Morton as secretary, accomplishes a lot of work in a most harmonious manner. Mention ought to be made of two Yorkshire clergymen, the Rev. A. L. Curry and Rev. A. J. Ashley, whose work in connection with the Church Esperantist League has been of great benefit to the movement throughout the whole country. Space is at a premium, and many enthusiastic workers, who well merit special reference, have had to be omitted from this brief and incomplete resumé of the movement in Yorkshire. To these I tender my apologies, and will ask them to remember that after all, and above all, the only thing that matters is the success of the kara lingvo, and not the advancement of our own personal glory.

> JOHN MERCHANT, President of the Sheffield Group.

* * * *

Patriko, simpla soldato en la 9a regimento, iris al sia kolonelo, petante forpermeson por du semajnoj.

— Kial vi postulas du semajnojn? demandis

la kolonelo.

— Ĉar mia edzino estas tre malsana, respondis Pat, kaj la infanoj havas la kokluŝon, kaj ŝi multe bezonas mian helpon.

La kolonelo rigardis lin fikse dum du minutoj

kaj diris:

— Patriko, mi volonte donus al vi la forpermeson, sed hodiaŭ matene mi ricevis leteron de via edzino, en kiu ŝi petis, ke mi ne forpermesu vin, ĉar ŝi ne deziris havi vin en la domo, ĉar vi estas ĝeno por ŝi kaj batas ŝin, kiam vi tro drinkas.

- Tio sufiĉas, diris Pat. Mi supozas, ke

mi ne ricevos la forpermeson do?

— Mi supozas, ke ne, Patriko. Vi ne povas atendi tion en la cirkonstancoj?

Siavice Patriko nun fikse rigardis la kolonelon. Ekstarante ĉe la pordo, li diris:

— Kolonelo, ĉu mi diru ion al vi?

- Certe, Patriko, kio estas?

- Vi ne koleros, se mi diros ĝin, ĉu?

- Tute ne.

— Mi deziras diri, ke estas du belegaj mensogistoj en ĉi tiu ĉambro. Mi estas unu el ili. Mi estas fraŭlo, kaj havas nek edzinon nek infanojn.

Nita's Song.

From The Mountebanks.

Those days of old

How mad were we

To banish!

Thy love was told

Querido Mi

In Spanish.

And timid I

A-flush with shame

Elysian,

Could only sigh

Dieu, comme je t'aime

(Parisian.)

No matter e'en

Had'st thou been coined

A Merman.

Thou wouldst have been

Mein lieber freund

(That's German).

With joy serene

At thy caress

I'd pant "Ho!"

Mi amas vin

(You know that's ES-

-PERANTO).

Thy face ablaze

With loving pats

Felt tinglish;

For in those days

I loved thee —— that's

Plain English.

JOHN MERCHANT.

La Enigmo de la Pendigisto.

Iu justulo starigis pendigilon meze de ponto. Al ĉiu, kiu volis transiri la ponton, li demandis:

— Ču vi scias, kien vi iras?

Se tiu respondis vere, li permesis transiron. Tiun, kiu respondis malvere, li pendigis. Unu tagon viro venis, al kiu la pendigisto faris la kutiman demandon.

La viro respondis:

- Mi estas pendigota.

— Nu, diris la pendigisto, mi ne scias, kion fari. Se mi pendigos vin, vi parolis vere, kaj estos maljuste pendigita; se mi ne pendigos vin, via respondo estas malvera, kaj vi estas pendiginda laŭ mia regulo.

Kion li faris?

[Ni invitas niajn legantojn respondi la demandon.]



New Competition for Boys and Girls.

Conducted by Miss JANE BAIRD.

This Competition is limited to boys and girls of not more than 15 years of age. Com-

petitors must write their solutions on a postcard addressed "KONKURSO," c/o Miss JANE BAIRD, 95, Bellevue Road, Edinburgh, and add their age and the name of their school. A Monthly Prize will be given, and at the end of the Competition special prizes will be awarded to those whose names appear most frequently in the Honours List.

N.B.—It must be understood that Solutions are the competitors' unaided work.

In schools where Esperanto is taught it is suggested that the teacher collect the cards and send them in

under an envelope, to save postage.

FIRST COMPETITION.

Postcards to be sent not later than 20th January.

Ĉe la Spicisto.

Mi eniris en la butikon de spicisto kaj faris kelkajn aĉetaĵojn. Eltrovu la nomojn (nur radikojn) de tiuj, kaŝitajn en la jenaj frazoj:—

1. Mi respondos al vi pri la mono.

2. Faru nenion ĝis mia alveno.

 Kun malfacileco li balbute respondis "Ne, sinjoro."

4. Ĉi tiu estas la dika fingro, ĉu ne?

Mi vizitis vian domon, sed vi jam estis for.

6. Li sciigis ŝin, ke li intencas tuj foriri.

Kies apartenaĵoj kuŝas sur la tablo?
 Li tre deziras iri esplori Zanzibaron.

9. La kovrilo estas farita el dika katuno.

10. Konfesu, ke, rilate al tiu grava afero, vi nenion scias.

* * * *

Scienculo enŝipiĝis en ŝipeton por transveturi larĝan lagon. Li diris al ŝipisto:

— Ĉu vi konas la historion ?

-- Ne.

- Vi do perdis la duonon de via vivo!

— Cu vi konas la matematikon?

- Ne.

— Vi do perdis la tri kvaronojn de via vivo! Dum la scienculo parolis tiujn lastajn vortojn leviĝis forta vento, kiu renversis la ŝipeton.

— Ĉu vi konas la naĝarton? diris siavice la ŝipisto al la baraktanta en la akvo scienculo.

- Ve! Ho ve! ne!

— Des pli malbone, ĉar nun vi perdis vian tutan vivon!

Letero el Londono.

La 14an de Decembro, 1919.

Guste kiam mi altabliĝis por skribi mian de longe promesitan leteron, alvenis de la "fino de la mondo" (malproksima parto de Londono) du samideanoj amikaj kun multaj sciigoj pri nia movado. Iliaj informoj estis tiel multenombraj kaj interesaj, ke la spaco konsentita al mi ne sufiĉus, se ĉion mi volus raporti! Mi nur diros, ke la Gildo de Vojaĝantoj de la Kooperativaj Societoj decidis studi Esperanton por ĝin uzi dum vizitoj sur la Kontinento.

Sed....mi ne devas paroli pri Esperanto! Tiun temon mi devas lasi al aliaj, kaj nur povas babili pri aferoj malpli interesaj. Pri kio? mi demandis al la redaktoroj? Pri io ajn, venis la respondo; sed plenigu unu paĝon pri okazintaĵoj en Londono! Nu, do, tiom

da aferoj priatentindaj okazis!

Pluvis, pluvegis, kaj eĉ neĝis dum la monato! La suno briletis de tempo al tempo!—S-ro Clemenceau venis kaj jam foriris! Strikoj okazis kaj finiĝis! Bankistoj, komercistoj kaj privatuloj ĉu gajnis, ĉu perdis monon pri la konstanta ŝanĝiĝo de la diversaj naciaj monkurzoj! Profitemuloj ankoraŭ rabas la publikon. Sed tio estas malgravaj, ne pri skribindaj eroj.

La ĉefa temo de la monato estas Carpentier la "Boksisto"! Jes, li venis, venkis, kaj foriris... sed ĉiu ankoraŭ parolas pri li! Ĉu li batalos kontraŭ Dempsey? Kie? Por kiom da mono? Jen demandoj vere gravaj! La heroo baldaŭ revenos Londonon, kie la

franca kolonio lin gastigos.

Efektive, li estas heroo. En malpli ol du minutoj li donis kvin batojn al sia kontraŭulo kaj fariĝis riĉa homo! Dume multaj aliaj sportemuloj perdis monon! La batalo estis finita, antaŭ ol la maljunaj sinjoroj havis la tempon purigi siajn okulvitrojn! La junulinoj ĵus ekfaris rimarkojn pri hia anĝela vizaĝo! Junuloj, estontaj boksistoj, komencis pridiskuti la mezurojn de lia korpopartoj aŭ liajn ŝancojn, kiam la juĝisto kriis "Finite."

Dum momento, la 5,000 persona rigardantaro silentiĝis. Neniu povis kredi, ke nervema franco tiel rapide venkis dikan, fortan, spertan boksiston anglan. Sed tiam nepriskribebla entuziasmo regis! Krioj, kriegoj, aplaŭdoj aŭdiĝis; ĉapoj, bastonoj manoj leviĝas. Fraŭlinoj sendas al la gajninto kisojn, kaj unu, feliĉulino! efektive povas unu doni. La heroo estas surŝultre portita. Nun iom post iom la halo malpleniĝas, kaj grumbluloj diras, "ĝi ne valoris £25"!

Ekstere, sur la strato, fremdulo demandas

sin, kio okazas? Kial amasiĝis miloj da geviroj, junaj kaj maljunaj, riĉaj kaj malriĉaj, ĉiuj seriozaj, silentaj, kvazaŭ decidoj pri vivo aŭ morto de popolo estas atendata? Antaŭ ol li povis solvi la enigmon, tiu amaso ŝajne freneziĝis. Kelkaj krias, kriegas, bruas ĉiamaniere, aliaj dancas, aliaj batalas, ĉiuj sin puŝas. Kio okazis? demandas sin denove la fremdulo!

Fine! la virinoj estas feliĉaj!

Sen rompado de fenestroj, sen bruligo de leteroj en la leterujoj, sen elmontradoj antaŭ la parlamentejo aŭ la domoj, de la ministroj, virino estas elektita membro aŭ "membrino" de Parlamento.

Fakto kurioza estas, ke tiu unua virina reprezentanto estas de Amerika deveno. Lady Astor tuj montris al siaj viraj kolegoj, ke ŝi intencas esti sendependa kaj sentima, iuokaze voĉdonante kontraŭ la politika partio, kiu ŝin elektis. Ŝia unua voĉdono pruvas, ke la virinaj demandoj estos de nun serioze defenditaj en la Parlamentejo.

Progresemuloj esperas, ke okaze de la proksima elekto pli da virinoj estos aldonataj al la

listo de parlamentaninoj.

La ordinara publiko kaj gazetaro ĉefe interesiĝas pri detaloj de etiketo kaj vestado de la unua elektitino! Ĉu ŝi portos ĉapelon aŭ ne? Ĉu ŝi salutos malnovmode aŭ kiel?Sed la historio montros, ke pli seriozaj aferoj dependos de tiu plua grava paŝo sur la vojo al plena kamarada kunlaboro de la du seksoj.

P. Blaise.

Pri D-ro J. Pollen.

En la lasta presmomento ni bedaŭre ricevis el Irelando tre malĝojigajn sciigojn pri la sano de nia amata Prezidinto. Lia edzino skribis la 19an de Decembro, ke la kuracisto insistis, ke li enlitiĝu kaj restu tie tre kviete; li tre afliktiĝas pro tio, nee oni ne permesas al li plue labori.

Sendube ĉiu brita Esperantisto sendos al li per tiu ĉi paragrafo tre koran saluton kaj la esprimon de forta deziro por lia rapida resaniĝo.

* * * *

The Examinations Committee begs to announce that on Monday, Feb. 9, at the offices of the Association, 17, Hart-street, London, W.C.1., will be held an Examination for the Preliminary Certificate, at 6.30 p.m., and on Wednesday, Feb. 10th, an Examination for the Advanced Certificate, at 6.0 p.m. Candidates should intimate as soon as possible their intention to be present.

Esperantista Konferenco.

Paris, 21-25 Septembro, 1919.

La Konferenco havis ok kunsidojn en la ĉambrego de la Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris. Ili estis prezidataj de S-roj Rollet de l'Isle, Prezidanto de la Franca Societo por Propagando de Esperanto, ano de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, de la Lingva Komitato, de la Administra Komitato kaj de la Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Societoj, kaj J. M. Warden, Prezidanto de la Brita Esperantista Asocio, ano de la Lingva Komitato kaj de la Administra Komitato. S-ro Gabriel Chavet plenumis la taskon de Sekretario.

S-ro Generalo Sebert, malsana, ne povis partopreni la laborojn de la kunsidoj, sed li poste aprobis ĉiujn

rezoluciojn.

En la fina kunsido, kiu okazis la 25-an de Septembro vespere, kun la prezido de S-ro Warden, ĉiuj rezolucioj de la Konferenco estis voĉdonitaj unuanime de la

ceestantaj Esperantistoj.

Ĉiuj regularoj de la Oficialaj Institucioj, pri kiuj oni laboris dum la Konferenco, troviĝas en la broŝuro Fundamentaj Dokumentoj pri la Oficialaj Institucioj de Esperanto, 1914. (Paris, Centra Oficejo, 0,25.)

Tekstoj Voĉdonitaj de la Konferenco.

Memoro al D-ro Zamenhof kaj al la mortintaj Esperantistoj.

La Konferenco, antaŭ ĉiu laboro, salutas kun emocio la karan memoron pri la neforgesebla aŭtoro de Esperanto, D-ro Zamenhof, kaj la memoron pri ĉiuj Esperantistoj, kiuj mortis dum la milit-periodo.

La Konferenco petas S-inon Zamenhof kaj la familion de nia Majstro akcepti la esprimon de sia

respekta kaj profunda simpatio.

La Konferenco aŭdis kun kontentiĝo:

 ke la nove fondita Esperantista Centra Librejo intencas ĉefe labori pri la ĉiulanda disvendado de la verkoj de D-ro Zamenhof, interkonsente kun la antaŭa eldonisto de tiuj verkoj.

 ke la Biblia Esperantista Komitato ageme laboras por disvendi la esperantan tradukon de la Biblio,

verkitan de Zamenhof.

La Konferenco esperas, ke ĉiuj Esperantistoj volos posedi la verkaron de nia Majstro.

Reorganizo de nia Movado.

La Konferenco,

konsiderante, ke la nuna stato de la mondo postulas pli ol iam la uzon de internacia lingvo,

konsiderante, ke Esperanto jam pruvis sian plenan

utiligeblecon en ĉiuj fakoj,

dezirante, ke la ĝenerala movado por la disvastigo

de Esperanto revigliĝu plej rapide,

petas la Centran Oficejon, ke ĝi prezentu al la koncernataj organizaĵoj la sekvantajn deziresprimojn kaj rekomendojn, kaj kolektu la deziratajn respondojn antaŭ la fino de la jaro.

Esperantista Lingva Komitato.

La Konferenco esprimas la deziron:

 ke la Lingva Komitato reprenu sian agadon laŭ la metodo jam proponita de la Sekretario kaj ke ĝi, kiel eble plej baldaŭ, elektu novan prezidanton por anstataŭi la bedaŭratan S-ron Borrac; 2. ke la sekretario sendu al ĉiuj Akademianoj, kiuj ĝis nun ne respondis al liaj leteroj, rekomenditan leteron, kaj ke post sufiĉa templimo, se neniu respondo alvenis, la laboro estu daŭrigata, kun la partopreno de la solaj respondintoj;

 ke la sekretario sendu leteron al ĉiuj Lingvokomitatanoj, por demandi ilin, ĉu ili estas ĉiam pretaj

labori por la Komitato.

La Konferenco esprimas la opinion:

I. ke ĉiu persono, kiu deziras ŝanĝojn en la lingvo Esperanto devas sin turni al la Lingva Komitato, laŭ la regula formo, ĉar tiu institucio estas la sola, kiu

rajtas solvi ĉiujn lingvajn demandojn;

2. ke la metodo, kiu konsistas apliki tiujn proponojn pri ŝanĝoj per starigo de nova formo de lingvo, kun instruaj libroj, gazetoj, grupoj, kaj oficialaj institucioj estas tute neregula kaj anarkia, kaj kredigante al la publiko, ke Esperanto havas konkurantojn, multe malhelpas la propagandon kaj sukceson de Esperanto kaj de la ĝenerala ideo pri lingvo internacia.

 ke speciale la eco de ano de Akademio, Lingva Komitato aŭ de iu esperantista societo ne estas akordigebla kun la eco de fondinto, direktanto aŭ

propagandanto de tia neregula movado.

Pro tio, la Konferenco esprimas la deziron, ke S-ro DE SAUSSURE, ano de la Esperantista Akademio kaj liaj esperantistaj kunlaborantoj, aŭ ĉesigu sian propagandon por nova formo de lingvo internacia, aŭ eksiĝu el ĉiuj oficialaj postenoj, kiujn ili tenas de la konfido de la Esperantistaro.

La Konferenco deziras:

ke, en la estonto, la kandidatoj al la Lingvo Komitato sciu almenaŭ unu fremdan lingvon de alia lingva familio ol sia propra, aŭ alimaniere estu pruvintaj sian lingvan kompetentecon.

La Konferenco esprimas la deziron:

ke la redaktantoj de gazetoj kaj oficialaj eldonaĵoj, ne enkonduku la uzon de io anstataŭ ujo, sen oficiala decido de la Lingva Komitato.

La Konferenco deziras:

ke, pro ĉiu Lingvokomitatano estu pagata kotizo sufiĉe alta, por ke la sumo de ĉiuj kotizoj alportu necesan helpon por la materiala vivo de la Komitato.

Konstanta Komitato de la Kongresoj.

La Konferenco deziras:

1. ke la Konstanta Komitato de la Kongresoj

reorganiziĝu,

 ke ĝi elektu novan kuratoron de la Kongresa Kaso por anstataŭi la bedaŭratan kolegon S-ron Mudie.

ke la reprezentantoj de la Kongresoj estu :

La anoj por la deka Kongreso, La anoj por la dek-unua Kongreso,

La anoj por la projektata dekdua Kongreso.

Rajtigitaj Delegitoj.

La Konferenco opinias :

ke la organizo de la voĉdonado de la Rajtigitaj Delegitoj en la Universalaj Kongresoj montriĝis kiel la plej taŭga sistemo por ebligi al ĉiuj Esperantistoj, ke ili esprimigu almenaŭ unu fojon ĉiujare sian opinion pri la ĝeneralaj komuninteresaj demandoj pri la progresado de Esperanto; ke tiu organizo donas al niaj Universalaj Kongresoj specialan intereson kaj seriozan karakteron, kiujn ili ne havas, se tiuj Rajtigitaj Delegitoj ne ekzistus:

ke fine la voĉdonado de la Rajtigitaj Delegitoj solene sankcias la decidojn kaj agadojn de la Oficialaj

Institucioj de Esperanto.

Sekve la Konferenco deziras, ke la regularo pri la Rajtigitaj Delegitoj estu konservata kaj aplikata en la estonto.

Estontaj Kongresoj.

La Konferenco opinias, ke nepre necese estas organizi

Kongreson en 1920;

esprimas siajn bedaŭrojn, ke la cirkonstancoj ne ebligas al la danaj samideanoj organizi tiun Kongreson kaj plezure aŭdas, ke verŝajne ili povos organizi Kongreson en 1921.

La Konferenco deziras, ke unu el la plej proksimaj Kongresoj okazu en Varsovio por honori la memoron

de D-ro Zamenhof.

Esperantista Centra Oficejo.

La Konferenco opinias:

 ke la Esperantista Centra Oficejo nepre bezonas fortan financan helpon, por ke ĝi daŭrigu sian regulan funkciadon, laŭ la deziroj oficiale esprimitaj de la

Universalaj Kongresoj.

2. ke pro tio necese estas, krei la Internacian Societon de Amikoj de Esperanto kun naciaj sekcioj aŭ filioj, laŭ la plano jam montrita de la cirkulero de la 6-a de Novembro 1905, kaj kies ĉefa tasko estos starigi kapitalon aŭ konstantan monoferadon por la vivo de la Centra Oficejo;

 ke tiu Societo de Amikoj de Esperanto tute ne konkuros kun la propagandaj kaj aplikaj societoj,

kies celoj estas tute aliaj.

" Oficiala Gazeto Esperantista."

La Konferenco deziras:

ke la Oficiala Gazeto daŭrigu sian publikiĝon kaj estu subtenata per abono de ĉiuj societoj kaj grupoj. (Jara abono: 5 frankoj.)

Internacia Unuigo de Esperantistaj Societoj.

Pri la Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Societoj, la Konferenco opinias:

1. ke laŭ la regularo de tiu Unuiĝo, ĉiu nacia asocio

konservas sian plenan sendependecon:

2. ke, ĉar tiu Unuiĝo ĝis nun ne povis funkcii pro militaj circonstancoj, oni devas atendi por juĝi ĝin, ĝis la momento, kiam sufiĉa spertado estos montrinta,

ĉu ĝi estas efektive efika kaj utila;

3. ke tiu atendo esta s des pli dezirinda, ke la ekzisto de tia Unuiĝo ŝajnas speciale dezirinda en la nuna epoko, por starigi rilatojn inter la Esperantistaro kaj la diversaj internaciaj organismoj, kiuj disvolviĝos, kiel ekzemple la kreita Societo de Nacioj.

Generala Propagando.

La Konferenco deziras:

ke en ĉiu lando ekzistu nur unu oficiala propaganda centra societo, kiu povos havi regionajn federaciojn.

La Konferenco,

aŭdis kun intereso, ke oni intencas eldoni centran literaturan gazeton, kiu kunigos Lingvo Internacia kaj la Revuo.

La Konferenco deziras:

ke por daŭrigi la programon, kiun sekvis D-ro ZAMENHOF, de la komenco, kiam li eldonis Adresaron de Esperantistoj, kiu ebligis al ĉiuj samideanoj facile interrilati unuj kun la aliaj,

oni daŭrigu la eldonon de la Tutmonda Jarlibro

Esperantista, donante ne nur la adresojn de ĉiuj societoj kaj grupoj, sed ankaŭ la adreson de ĉiuj esperantistoj, kiuj tion akceptos.

Rilatoj inter la Oficialaj Institucioj kaj la ceteraj Organizaĵoj,

La Konferenco opinias:

ke nebone estas starigi ĝeneralajn konstantajn kontraktojn inter la Oficialaj Institucioj de Esperanto kaj aliaj esperantistaj asocioj, sed ke laŭ la cirkonstancoj specialaj kontraktoj estu farataj, por ke en la diversaj agadoj de la esperantista vivo ĉiuj organizaĵoj laboru en plena akordo kaj per unuigo de fortoj kaj por ŝparigo de tempo, mono kaj klopodoj.

Salutoj kaj Dankoj.

La Konferenco sendas al Sinjoro Generalo Sebert siajn simpatiajn sentojn kun la varma espero kaj deziro, ke li baldaŭ resaniĝos kaj daŭrigos sian agadon

por Esperanto.

La Konferenco kore dankas Sinjorojn Warden kaj Butler, kiuj venis de Britujo por partopreni en ĝiaj laboroj, kaj ĉiujn kunvokitajn samideanojn, kiuj ne povis ĉeesti, kaj kiuj sendis leterojn de bondeziroj kaj studotajn proponojn.

La Prezidanioj: M. ROLLET DE L'ISLE, J. M. WARDEN.

La Sekretario: G. CHAVET.

El Oficiala Gazeto Esperantista, 25 Okt., 1919.

* * * *

Alvoko al la Brita Esperantistaro.

3, BIRDHURST ROAD, CROYDON,
Novembro, 1919.

KARA SAMIDEANO,

Laŭ la ĵurnaloj kaj privataj leteroj ekzistas granda mizero en Vieno, pro manko de manĝaĵoj, karbo, lakto, k.t.p. La virinoj kaj infanoj terure suferas, kaj infanoj mortadas pro malvarmeco kaj manko de lakto. Ŝajnas al mi, ke la Esperantistaro de la tuta mondo, kiel vera frataro, kaj Ligo de Nacioj povas helpi la Vienan Esperantistaron per la sendo ĉiusemajne aŭ ĉiumonate de paketoj da manĝaĵoj. Mi jam skribis al la Board of Trade, kaj ĵus ricevis la sekvantan respondon.......

"I am directed to draw your attention to the notice which appears on page 552 of the Board of Trade Journal, dated 30th October, 1919, from which you will observe that parcels containing foodstuffs (for the personal use of the addressees, and not for trading purposes) may be exported by parcel post to all destinations, other than Bolshevist Russia, without Privy

Council Licence being necessary."

Mi esperas, ke viaj grupanoj povos sendi paketojn al diversaj esperantistoj en Vieno. La sendkosto de poŝtpakaĵoj de 7 funtoj estas 2ŝ. 1p, 11 funtoj 2ŝ 5p.

Mi rekomendas, ke oni sendu lakton (aŭ sekitan aŭ en skatolo) biskvitojn, farunaĵojn, k.t.p. La reguloj por la sendado estas haveblaj ĉe iu poŝtoficejo. Petu P.P.21, kaj P.P.48. Jen kelkaj adresoj de esperantistoj en Vieno.......

D-ro Ed. Sős, D. de U.E.A. redaktoro de "La Nova Tempo," Lerchenfeldstrasse 178. Wien VIII.

S-ro Hugo Steinhauer, V.D. de U.E.A. Valeriestrasse 8. Wien ii.

S-ro A. Deistler, Schottenfeldstr 91. Wien VII. D-ro Arb. Popolan, redaktoro de "La Esperantisto," Poŝtoficejo 34. Wien II/1.

Via sincere,

J. BREDALL.

" Bis dat qui cito dat."

"Kiu tuj sendas, tiu duoble sendas."

Ankaŭ vidu. "Save the Children Fund," p. 14.

Dek-Dua Universala Kongreso de Esperanto.

AL LA TUTMONDA SAMIDEANARO!

Post interkorespondado kun la Konstanta Komitato de la Kongresoj, la Hagaj Esperantistaj societoj decidis akcepti la inviton, okazigi la dek-duan Universalan Kongreson de Esperanto en nia registara urbo 's-Graven-hage (Esperante: Hago), dum somero 1920.

Kompreneble, ni ĉiuj interkonsentas, ke la ĝenerala spirito de l'unua postmilita Esperanto-kongreso (preparata en nelonga tempo) ne estos simila al tiu de niaj antaŭaj grandiozaj kongresoj. Sed kiu venos Hagon por antaŭ ĉio viziti laborantan kongreson celantan la restarigon de niaj internaciaj interrilatoj kaj la reorganizon de nia movado, tiu certe ne bedaŭros sian

vojagon. Sabaton 15 novembro konstituiĝis nia loka kongreskomitato: ĉiuj kvar Hagaj societoj harmonie kunlaboros. Estas membroj de l' komitato la jenaj samideanoj: S-ro J. R. G. Isbrücker, prezidanto, Hoogeweg 68, Watergraafomeer, apud Amsterdam, kiu komence de 1920 kun sia edzino ekloĝos en Hago; S-ro J. L. Bruijn, sekretario-kasisto, Paul Krugerlaan, 37, Hago (por rekomenditaĵoj aldonu ĉe la adreso: Poŝtkontoro de la Reykade); F-ino N. Boon; S-ino J. C. Isbrücker-Dirksen; S-roj W. G. A. Kaupe kaj H. C. Mees, ĉiuj membroj de "Fine ĝi Venkos" (sekcio de la Nederlanda Esperantista Societo "La Estonto estas nia"); S-roj H. Laarhoven kaj F. Marrevee, ambaŭ membroj de l' Roman-Katolika Esperantista Societo (sekcio de l' Ned. R. K. Esp. Ligo); S-roj F. J. Visser, J. H. Visser kaj M. P. de Wilde, ĉiuj membroj de l' tramista klubo "Ciam antaŭen" (sekcio de l' Ned. Esp. Soc.); S-roj H. Kratz kaj L. van Munster, ambaŭ membroj de l'Generala Haga Laborista Esperantista Klubo (sekcio de l' Ned. Federacio de Lab. Esp.).

La du unue nomitaj sinjoroj Isbrücker kaj Bruijn eksidos en la Konstanta Komitato de la Kongresoj. Diversaj subkomitatoj por enloĝigoj, ekskursoj, festvespero, diservoj, k.c. estos formataj. Honorkomitato formata el eminentaj personoj en Nederlando (speciale en Hago) estos starigata. Pri la kongressalonego klopodoj en diversaj direktoj estas farataj.

Al la K. K. estas submetataj por aprobo la jenaj

decidoj:

1e okazigi la kongreson en la *unua semajno (1-7) de Septembro 1920 :

2e fiksi la kongreskotizaĵon je 10 Nederlandaj

guldenoj;

3e permesi, ke samideanoj el landoj kun malfavorega kurzo je Nederlando (ekzemple Germanujo, Aŭstrujo, Belgujo, Francujo, ĉiuj novaj Eŭropaj ŝtatoj, k.c.) pagu siajn kotizaĵojn ekstreme en majo 1920, kiam supozeble la diversaj malaltaj kurzoj almenaŭ iom estos pliboniĝintaj;

4e formi garantian fundon per enskriboj de sumoj

po 25 guldenoj.

KARAJ GESAMIDEANOJ,

Jen la unuaj komunikoj pri nia dek-dua. Depost kiam vi estos leginta ilin, eklaboru por nia kongreso, por ke ĝi fariĝu sukceso! Ni kalkulas je almenaŭ 400 kongresanoj diversnaciaj, kaj samideanoj el landoj kiel Grand-Britujo, Svisujo, Hispanujo, Skandinavio kaj Nord-Ameriko jam nun sendu siajn kotizaĵojn (mondonacon krome ni ankaŭ ne malŝatos!) por faciligi al ni la preparadon kaj aranĝadon de l' kongreso. Monsendojn oni faru rekte al la Residentiebank en Hago (do ne al la kasisto), kiu malfermis kongreskonton.

Kun samideanaj salutoj,

J. L. BRUIJN,

Sekretario de l' Loka Kongreskomitato.

* Oni nun proponas la duan semajnon (8-15) en Aŭgusto.

* * * *

CHRONICLE.

Matter for the Chronicle should be sent to the Editor not later than the 12th of the month, for insertion in the following number. Reports may be in English. Matter for "Coming Events" (which should be as concise as possible) may be sent in up till the 20th. Secretaries, please note Address: 17, Hart-street, London, W.C.1.

COMING EVENTS.

Diservo en Esperanto okazos dimanĉon, Januaro II, je 3.15, en Harecourt Church, St. Paul's Road, Canonbury, London, N.I., kiam espereble legos el Biblo S-ro J. M. Warden, Prezidanto de la B.E.A.

Konferenco de la Nacia Unuiĝo de Instruistoj.—En Brighton je Pasko, 1920, la Brighton-kaj-Hova Grupo invitas gesamideanojn, kiuj intencas ĉeesti je Pasko, sendi nomon kaj adreson al Hon. Sek., Mons. A. Dorlencourt, 14, York Villas, Brighton.

Rendevuoj por Esperantistoj.—Sabate.—Horo 3, "British Museum." Horo 4.30, Restoracio Lyons, 123, High Holborn (kontraŭ, "Holborn Restaurant.") Dimanĉe.—Horo 4.10, Lyons, proksime de Knightsbridge Tube Stacio, 7, Brompton Road, S.W.1.

London Club.—A FESTIVAL to celebrate the commencement of the Club's Seventeenth Year will be held on Friday, the 9th of January, at St. Bride's Institute, Bride Lane, Ludgate Circus, E.C.4. It will consist of a Dance in the large hall from 7.30—10.30; a Sale of Work in the Small Hall at 7, and a Concert in Hall 3, at 7.30. It is earnestly requested that all

members of the Club will do their best to make this festival meeting a success by coming themselves and bringing their friends. Tickets of admission (1s. 6d.) may be obtained from Mr. W. H. Browne, 5, Kempshead Road, S.E.5, or from Mr. C. H. Edmonds, 254, Wightman Road, N.8. They should be bought before the day, as they must not be sold at the Institute.

Al la Laboristoj!—Ĉe la Labour College, 13, Penywern Road, Earl's Court, London, S.W., oni kondukas Esperantan kurson. Alilandaj laboristaj grupoj aŭ individuoj, bonvule skribu al S-ro Mark Starr ĉe la kolegio.

Industrioj de Botoj kaj ŝuoj kaj la Fabrikado de Ombreloj.—La Brita Literatura kaj Debata Societo preparas anglan-Esperantan vortaron por tiuj ĉi industrioj kaj petas la helpon de spertaj Esperantistoj tiumetiaj en la sekvantaj landoj:—Francujo, Germanujo, Hispanujo, Italujo. Laŭ peto la Societo sendos la jam faritajn slipojn de provvortoj en kvin lingvoj por kritikoj kaj proponoj. Skribu al Sekretario por Teknikaj Vortaroj, B.L. kaj D.S., S-ro E. E. Yelland, 48, Middleton Road, Dalston, London, E.S., Anglujo.

LONDON.

Meeting and Concert at the London Day Training College.—This enjoyable gathering, organised by Mr. G. J. Cox, was held at the College on November 22nd, by permission of the University authorities and the London County Education Committee. The chair was taken by Col. H. FISHER, General Secretary of the League of Nations Union, who in an excellent speech described the ideals of the League of Nations and the methods by which it is proposed to draw the nations closer together in friendly co-operation and cordial brotherhood. During the evening Mr. G. J. Cox gave an eloquent description of the aims of Esperanto and its suitability for the rôle of an international tongue, and referred to its introduction into the schools and the instances already available to prove its success when taught to children. These speeches were warmly applauded by a large and keenly interested audience, as were the other items which completed the programme. It is not possible to describe these in detail, but mention may be made of the solos by Miss Rosa Maude and Miss K. Stevens, the choruses rendered by the ESPERANTO BOYS' CHOIR, the drolleries of Mr. HARRISON HILL and the spirited recital by Mr. FULCHER of the speech of Mark Antony over the body of Caesar; the various performances well illustrating the suitability of Esperanto for both drama and song. During the evening impromptu speeches were made in Esperanto by Mr. ALVAREZ (Spain) and Mr. BLAISE (Belgium), and translated into English by Messrs. Butler and LONG.

Sydenham, London, S.E.—On the 19th November, Mr. W. K. Robinson read a paper on the International Language problem before some forty members of the Literary and Musical Society of Sydenham Wesleyan Methodist Church; it was well received and aroused considerable interest. Those wishing to know more of the matter should communicate with Mr. Robinson at 43, Trewsbury Road.

ELSEWHERE.

Barry (Glam.).—Mr. P. H. Evans, of the Romilly Road Boys' School, has begun to teach Esperanto in his class (standard IV.), and reports that the boys are very keen and are making good progress. Both the Headmaster, Mr. R. T. Evans, and himself, are enthusiastic Esperantists and are endeavouring to obtain the permission of H.M. Inspector to include the language into the curriculum.

Edinburgh.—La grupkunvenoj estas tre bone vizitataj. Nov. 7, F-ino Stewart pritraktis la teatraĵon "Everyman"; Dec. 3, S-ro Page parolis pri "la arto de publika parolado"; Dec. 10, okazis prezento de dialogo kun aŭguristino, en kiu F-inoj Eunson kaj Mackenzie partoprenis; kaj Dec. 17 la grupo festis la naskotagon de Zamenhof, kiam S-ro Warden laŭtlegis ĉapitron el la aperonta biografio de Zamenhof verkitan de D-ro Edmond Privat.

Formby.—A lecture on "Esperanto for Business and for The League of Nations" was delivered by Mr. J. Applebaum, of Liverpool, on the 22nd November, in the Reading Room of Holy Trinity Parish Hall. The audience was not large, but was much interested and decided to form a class under the tuition of the Rev. Farnley, Vicar of St. Luke's. Councillor Butler, who presided, was much impressed by Mr. Applebaum's arguments and promised to use his influence to get both evening and day classes started.

Glasgovo. - Sabaton la 20an de Decembro, "Zamenhof-Tago" estas festita de la Glasgova Societo per speciala kunveno kaj koncerto. Oni ŝanĝis la daton de la festo por ebligi la ĉeeston de tiuj lernantoj, kiuj estis okupataj je la 15a. Ni devas danki al la Foreign Students' Foyer pro la permeso uzi ilian koncert-halon. Estis sufiĉe granda ĉeestantaro, kaj ĉio iris bonege. S-ro David Kennedy faris elokventan paroladon pri "La tago, kiun ni festas." Li pritraktis la kreadon de Esperanto kaj la vivon de Zamenhof kaj urĝe konsilis ĉiujn, ke ili faru tri Nov-jarajn rezoluciojn. Unue :--Legu Esperanton kiel eble plej multe. Due :- Parolu la lingvon por akiri fluecon kaj, se eble, aliĝu al la Glasgova Parol-Rondo, kiu kunvenas ĉiuĵaŭde kaj ĉiudimanĉe. Trie: - Komencu korespondadon kun alilandaj Esperantistoj. Tio ne nur estas bonega ekzerciĝo, sed ankaŭ estos granda plezuro. S-ro Cedric F. White' dankinte S-ron Kennedy por lia parolado, aldonis kvaran rezolucion, ke ĉiu Esperantisto varbu unu novan lernanton ĉiumonate dum la jaro 1920. Se tio efektiviĝus tra la mondo, kaj ĉiu nova lernanto farus same, ni havus en 1921 milionojn da Esperantistoj. Kantis S-ro James Harvey siajn proprajn tradukojn, F-ino Wilson (la infanajn, kantojn de Applebaum kaj Mabon) S-ro Preston, S-ro Rice kaj S-ro Abbot. S-ro White rakontis harojn-levantan, sed dubeveran spertaĵon en Siberio, kie li mortigis polusan urson per glaciigitan ŝvit-kugleton! S-ro Couperthwaite legis leteron de S-ro Bredall pri la mizero en Vieno, Aŭstrujo, kaj la urĝa bezono de lakto kaj farunaĵoj por savi la vivon al la infanoj. Oni povas sendi postpakaĵojn po malpi ol la ordinara afrankkosto, kaj estas petate ke tiuj, kiuj simpatias, agu tuj. Estis ankaŭ anoncite, ke nova kurso por komencantoj komenciĝos ĉe la Societo je la 5a de Januaro.—F.C.

Kimrujo.—Je la 27a de Nov. Pastro W. H. Harris, M.A., B.Litt., de la Kolegio de S. David, Lampeter, vizitas Tregaron, kie li invitite, donis prelegon, titolitan "La Turo Babela" al la Kimra Gildo. Ĉeestis ĉirkaŭ 60 homoj, kaj dum unu horo, S-ro Harris priskribis la problemon de Komuna Help-lingvo kaj ĝia solvo sola—Esperanto. Li speciale atentigis sian aŭdantaron pri la rolo, kiun povas Esperanto ludi rilate al la Ligo de Nacioj, kiun la loka Gildo ekstudis.

Leith.—En la frua vintro propaganda kunveno okazis, kaj la rezulto estis, ke ni gajnis kelkajn rekrutojn.

Por pligrandigi la kason ni aranĝis vendadon de utilaj objektoj, kiu okazis sabaton, la sesan de Dec. Multaj el la Edinburgaj grupanoj aŭ helpis la vendadon aŭ vizitis kaj aĉetis. Nia kasistino, Fraŭlino Donaldson, organizis la aferon. Post la vendado oni kantis, deklamis kaj dancis ĝis post la naŭa. Ĉe la fino la prezidanto anoncis, ke la profito estas £24 7s. 6d.—granda sumo por tiel malgranda Grupo. Ĉe la proksima kunveno ni intencas diskuti la proponon, ke ĉiu grupano aliĝu al la B.E.A. en la venonta novjaro.—D.D.

On 19th November under the auspices of Leith Academy Former Pupils' Literary Society, Miss M McNab, Vice-Pres. of Leith Esperanto Society gave a. lecture on "Esperanto—The only Solution of the Language Problem."

Miss McNab also spoke on the same subject to St. Cuthbert's Co-operative Literary Society.

On both occasions great interest was shown and several questions were asked, while some of those present expressed a desire to have literature on the subject.

Liverpool.—Lundon la 15an de Decembro nia Grupo festis la naskiĝtagon de Zamenhof en speciala kunveno nomita "Zamenhofa Nokto." Ni havis la plezuron vidi inter ni kelkajn fidelulojn, kiuj jam delonge ne honoris nin per sia ĉeesto, kaj oni povas esperi, ke la ankoraŭ flagranta fajrero en ilia koro nun denove ekflamos por la bono de nia afero. Ni havis kantojn kaj deklamojn de diversaj anoj kaj paroladojn pri la vivo kaj la laboro de la doktoro. Entute la ĉeestintoj pasigis kelkajn agrablajn horojn.—J.D.A.

Sheffield.—La 28an de Novembro okazis koncerto ce la W.E.A. domo. S-ino Booth, S-ro Lawrence kaj F-ino Hessy bonege kantis, kaj S-ino Bateman kaj F-ino Ridge esperante deklamis. Multaj cestis kaj eklernis pri la frateco de la Esperanta movado.

La propagandaj klopodoj de S-ro J. Bateman bone

sukcesas.

Ĉiuvespere ie en la urbo oni instruas la karan lingvon. La konstanta kreskado de la Grupo post nelonge devigas nin ekokupi pli grandan ĉambron.

La venonta jaro promesas esti fruktoplena por ni. Dum Januaro kelke da publikaj paroladoj okazos pri Esperanto. R. H.

Worcester.—Laŭ la permeso de la Eduka Aŭtoritato, oficiala instruo estas farata en St. Paul's Church School.

La knaboj (proksimume dekjaraj) komencis lerni dum Novembro kaj progresas kuraĝige sub la gvidado de S-ro Walter Severn, A.C.P.—B.L.

The Prime Minister, Mr. Arthur Balfour, and Mr. Arthur Henderson are among the Members of Parliament who have written in acknowledgment of the Esperanto translation of the Contract of the League of Nations noticed in our November number.

Press Notices.—Daily Chronicle, Daily News, Globe, Morning Post, Everyman, The Freethinker, The Guardian, Islington Daily Gazette, Birmingham Post, Colne Times, Folkestone Herald, Harrogate Advertiser, Huddersfield Examiner, Liverpool Weekly Courier, Manchester City News, Oldham Standard, Sheffield Daily Telegraph, Sheffield Independent, Yorkshire Herald, Warrington Examiner, Co-operative News, Burnley News, Southport Visitor, Brisbane Daily Standard, Formby Times, Family Herald, The Democrat (Fine article on Esperanto by Mr. F. J. Gould).

In Monthlies.—The World Salesman (November) now edited in English, Chinese, Japanese, Spanish and Russian still continues its strong advocacy of Esperanto, in which language there are good grammatical and trade articles.—Portugal, Commercial, Industrial has a long article on Esperanto in Portuguese by Saldanha Carreira. Auchland (N.Z.) Labour News (Oct.)—C.O. Clink Chronicle (with quotations from the various C.O. prison journals, one of which Instigilo (Dorchester) was entirely in Esperanto; well-bound in cloth and with clever illustrations, the entire make-up was exceptionally attractive; quite in the style of our best monthly magazines. The well-known "Tagulo" was largely responsible for it.)

. . . .

Save the Children Fund.

We would earnestly appeal to all our readers to immediately interest themselves in the above fund. The distress throughout the famine areas of Europe is very great, especially among the children. Immediate help may save many thousands from starvation. The Government has appealed to the public to help. £1 is given by the Government for every £1 raised and spent on approved schemes. All money is distributed though existing relief agencies and donations can be earmarked for any area desired. It is suggested that contributors should mention the fact that they are Esperantists.

The fullest particulars can be obtained from and donations will be received by

THE SECRETARY, SAVE THE CHILDREN FUND, 7, St. James's Terrace,

Regent's Park, London, N.W.8.

Also see p. 11.

EA en Londono.

Pro manko de tempo kaj troa privata laboro, mi estas devigata forlasi la muletnombran kaj diversspecan

korespondadon rilatantan je UEA.

Feliĉe, tamen, mi trovis kiel taŭgan anstataŭanton, S-ron Harry A. Epstein, antaŭ nelonge malmobilizitan kiu antaŭ la milito jam foje agis kiel ĉefdelegito por Londono. Li de nun estos sekretario de UEA sub la direkto de la Londona delegitaro.

Dum la milito mi provis kiel eble plej bone vivigi nian internacian Asocion per varbado de novaj anoj, reteno de la malnovaj, prizorgo de servoj ĉiuspecaj, k.t.p. La ĉiujara korespondado ricevita kaj sendita

estis pli ol 2,000 leteroj, kartoj kaj cirkuleroj!

Sendube kun reorganizo de internaciaj interrilatoj la petoj pri servoj fariĝos pli grandaj, kiel ankaŭ estos tre multaj la petoj pri sciigoj diversaj pro la reorganizo de UEA mem. Estas do necese, ke Sekretario povu dediĉi sian tutan tempon liberan al la Asocio, precipe por prizorgi la praktikajn demandojn. Sed, por eviti senutilan laboron al S-ro Epstein, konsilinde estas, ke ĉiu samideano notu ke de nun la jara kotizaĵo por membroj estas 4ŝ, kun Gazeto "Esperanto" 10ŝ.; abono al Gazeto sola 8ŝ.; Esperanta entrepreno 10ŝ.; subtenanta ano kun Gazeto 20ŝ.

Anoj de UEA kaj Esperantistoj, kiuj deziras aliĝi aŭ ricevi informojn pri la Asocio, skribu al S-ro-Epstein, 17, Hart Street, London, W.C.I. Li ĉiam

respondos.

De tempo al tempo raportetoj pri la praktikaj servoj faritaj de la Londona Sekretario aperos en "B.E." Ili estos utilaj informoj por propagandistoj kaj amikoj de Esperanto.

P. BLAISE, Cefdelegito.

* * * *

La Dek-unua Kongreso de Britaj Esperantistoj.

Kiel jam anoncite en la British Esperantist, la 11-a Brita Kongreso okazos en Birmingham dum Pentekosto, 1920. Antaŭ kelkaj semajnoj oni elektis.

la oficistojn, ili estas:

Sekretarioj, S-roj C. C. Goldsmith, 92, Douglas Road, Acocks Green, Birmingham kaj J. T. Taylor, 28, Anderson Road, Erdington, Birmingham Kasisto: S-ro W. H. Garbutt, Sekretarioj por loĝejoj, F-ino A. Dingley kaj S-ro. H. Hawker, kaj Redaktoro de la Kongres-libreto, S-ro. E. Biddle.

La Oficistoj nun laboras por la sukceso de la Kongreso kaj povas anonci, ke laŭ jam faritaj aranĝoj ĉiu kon-

gresano povas atendi feliĉan libertempon.

Jam konsentis fariĝi Protektantoj de la Kongreso: The Lord Bishop of Birmingham; Canon L. Blofeld (Principal, Saltley Training College), Rev. S. M. Berry, M.A., Sir Herbert Austin, K.B.E., M.P., Sir Francis Lowe, M.P., Sir Henry Manton, J.P., Alderman A. R., Jephcott, M.P.

La Kongres-Biletoj nun estas pretaj; la prezo estas ĝis la 15a de Aprilo, 1920, kvar ŝilingoj, kaj poste, kvin ŝilingoj. Ĉar la necesaj loĝejoj ne estas facile riceveblaj, la Komitato esperas, ke ĉiuj aĉetos siajn biletoj kiel eble plej baldaŭ. Ĉiu aĉetinto de bileto, ricevos la kongresan libreton kaj la insignon.

LIBRARO KAJ GAZETARO.

Angla kaj Esperanta Etimologio, de Charles G. Stuart-Menteth, B.A. (Oxon.); prezo 10 pencoj afrankite ĉe B.E.A. Jen libreto, kiun ni povas varme rekomendi al la vortamantoj kaj al la instruistoj de Esperanto. La celo de la verko estas pruvikaj evidentigi la naturecon de nia tiel nomita artefarita lingvo. Aparte interesa estas la tabelo de Esperantaj radikvortoj en aliaj Esperantaj radikoj, ekzemple: KAPo, oralo, italo, itelo, itolo, itano. La dua tabelo montras, ke la korelativaj vortoj estas de tute natura deveno. En la sepa tabelo troviĝas nomoj de komercaj markoj, kiuj enhavas Esperantajn radikoj n.

La libreto estas bone presita kaj preskaŭ tute sen

preseraroj.

Esperanto Stationery Packet.—This is a new issue of the B.E.A., which has already been very cordially welcomed. The Packet contains 24 sheets of linen-faced note paper and ten envelopes to match. Each sheet and envelope bears the Green Star encircled with the words Lingvo Internacia Esperanto. At the price of sevenpence a packet, it should not be too expensive for use in every kind of correspondence, where it cannot fail to be a very effective means of propaganda, without being in any way obtrusive.

Gazetoj Ricevitaj.—Amerika Esperantisto (Okt.) 16-paĝa oficiala organo de Esperantista Asocio de Norda Ameriko, en la angla lingvo kaj Esperanto. Abonpago: Sm. 2 jare. La nuna numero komenciĝas per insista alvoko de E.A.N.A. Prezidanto Edward S. Payson al la Amerikaj samideanoj subteni la novan serion de la jam tre plibonigita gazeto. Tre leginda kaj amuze serioza estas "Kiam silenti" de J. F. Martin. Sekvas: utila dulingvaĵo kun lingvaj notoj, tre taŭga por la lernanto; la Dua Aldono al U. V. kun anglaj signifoj; versaĵo, Tra la Tago; oficialaĵoj, kroniko k.t.p.

La Espero (Oktobro) oficiala organo por Sveda Esp.-Federacio kaj Norvega Esperantista Ligo; redaktata en la du lingvoj kaj Esperanto. Abonprezo kr. 4.50 ĉe

Sveda Esp.-Federacio, Stockholm 1.

Germana Esperantisto (Nov.-Dec.).—Eldonoj A kaj B. Kiel kutime en Eldono B troviĝas multe da tre interesaj bonstilaj legaĵoj en Esperanto. Eldono A. enhavas propagandajn artikolojn, oficialaĵojn, k.t.p. en la germana lingvo kaj kronikon en Esperanto.

De Januaro oni kunigos la Eldonojn A kaj B. kaj la G. E. aperos ĉiumonate en unu kajero enhavanta

16 paĝojn; Abonprezo, 7м.

Hispana Esperantisto (Oktobro).—16-paĝa ilustrita gazeto tute en la Esperanta lingvo; abonprezo, Sm. 2.400 ĉe S-ro Julio M. Rosenhörn, 19, Jaca (Huesca) Hispanujo.

Le Monde Esperantiste (Oct.-Nov.).—En la franca lingvo kaj Esperanto, jarabono: Fr.5. ĉe 3, rue Sophie-

Germain, Paris-14.

Kritikulo (15a de Novembro).—Unua numero de nova du-paĝa, grandformata gazeto hektografita. Ĉiumonate tri numeroj aperos.—Presita sur ruĝa papero, estas verde antaŭ la okuloj.—Ĝi estas organo de Unua Viena Esp. Unuiĝo; eldonanto: Theo. Jacobsen, Wien, VII., Strazzistrato 40/16. Austrujo.

Svisa Espero (Nov.-Dec.) tute en Esperanto; enhavas Raporton pri la Ĝenerala Kunveno de la Svisa Esp. Societo en 27/8 Sept.; Ankaŭ la leteron de S-ro Butler

pri la landnomoj, kaj kronikon.

Oficiala Gazeto Esperantista (Oktobro), tute en Esperanto; jarabono, 5 frankoj ĉe 51 rue de Clichy, Paris. Enhavas oficialan raporton de la Esperantista Konferenco okazinta 21-25 Sept., vidu pĝ. 10.

Esperanto Monthly (December) Zamenhof-day number. Contents: "Bialystock, la Naskiĝurbo de D-ro Zamenhof" tre interesa kun tri fotografaĵoj.—Ŝerca versaĵo" Neatendita Sukceso" de John Merchant—Anekdotoj—Result of Tenth Competition for Boys and Girls.—"Morituri te Salutamus."—adiaŭa artikolo de E.M. al ĝiaj legantoj.

Nia Folieto (Novembro) tute en Esperanto; organo

la Esperanto-Klubo "Progreso" en Gent.

Komerca Revuo, Internacia (Novembro). Preskaŭ tute en Esperanto, ilustrita. Enhavas 40 paĝojn da interesaj faktoj kaj opinioj por la komercistoj. Redaktoro: D-ro Hj. Unger, Zurich; jara abono, 5 frankoj.

Esperanto (Decembro).—Organo de U.E.A. tute en Esperanto; jara abono, 10 frankoj ĉe Museumstrasse 14, Bern, Svisujo. La titoloj de la artikoloj bone montras la diversecon de la gazetenhavo: La Internacia Labor-konferenco—Pri vojaĝo al nuna Rusio (sic)—Novaj Kamaradinoj (pri la skoltinoj en Bohemujo)—Insektŝtatoj—Ĝeneralaj Notoj (Literaturaĵoj el la novhebrea kaj angla lingvoj—U.E.A. aferoj—Kroniko—Inter ni. Tra la libraro—U.E.A. oficialaĵoj. Esp. Parolejo—Niaj Mortinto.

Ĵus Aperis

Our Advertisements.—Readers will notice that the advertisements in this number of The British Esperantist are considerably more numerous than usual. This is a result of special efforts made by our Business Manager, assisted by several samideanoj, whose interest in the prosperity of the magazine has led them to induce their friends to advertise with us; we are glad to say that our appeal on this matter in the December number has also begun to have an effect.

We would like to suggest to our readers that it is only fair that they should patronize our advertisers as far as possible, and when doing this they should not

forget to mention The British Esperantist.

Donations to B.E.A

	Brought forward,	Page 71	***		***	***	£23	5	10
	Alcorn, W.	***		***		•••	50 10000	5	0
	Allan, A	(140041)	***	34.4.4.3	***	***		3	0
	Armstrong, D.	***						2	6
	Bayes, W	363		***	***	***		12	9
	Blackmore, H.						1	0	0
	Cocks, W. H.			***	***		35	10	0
	Dempster, G. T.	***	***					2	6
	Fisher, Joseph							5	o
	Fitch, Howard		***					15	0
	Giles, A		***	***			1	0	o
	Y Y 1 72 T	***				***	1.0	7	u
		***			***	***			0
	Hildersley, H.	***	***		***	***		5	
	Kalisky, P.	****	***	***	***	***		11	0
	Kirkham, Rev. P.		+++	***	***	***		2	6
	Mason-Beatty, A.	E.	***	•••	***	***		5	0
	Morren, P. J.							4	10
	Nicholson, Mrs.	***				***		5	0
	Palmer-Jones, A.	***	***					2	t.
	Pay, F. A				***	***		5	0
	Sandeman, T. C.	***	***		***	***	2	18	4
	Sharp, A						2	0	0
	Sinnotte, Miss E.	Α.	***			***	I	I	9
	Swan, Miss A. M.					***		5	0
	Triffitt, A	•••			•••	***		2	6
1	Vernon-Harcourt,	-			•••		I	3	8
	77 1 A					***	-	2	0
	Zealer, A		100	***	***	10350	-		
	Total	•••	•••	***	•••	***	£37	19	II

The British Esperanto Association (Inc.)

EXTRACT FROM RULES.—" If no objection shall be lodged within fourteen days, the Secretary shall inform the candidate that he is admitted as a member."

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

JAMES BARSU, 102, Manchester-road, Accrington, Lancs.; JAMES F. Bowes, "Pinecrest," Station-road, Seamer, Scarborough; HOWARD CARDWELL-HILL, 22, Terrace-road, wansea; HAROLD CORN-THWAITE, 97, Talbot-road, Bournemouth; D-RO PIERRE CORRET, 19, Boulevard de la République, Versailles (Seine-et-Oise), France : GEO. TAYLOR DEMPSTER, c o Smith Bros., Caxton Blds., Bank-street, Kilmarnock, (Ayrs.); MISS GRACE E. FRANCIS, "Earlswood," Alexandra-road, Skegness, Lincs.; ARTHUR FROST, c/o Pendyffryn Hall, Penmaenmaur, N. Wales; HERBERT GALLAGHER, 264, Cambrai-street, Belfast; ALBAN GILES, Salters Hall, Newport, Salop; W. M. GOLDBERG, 88, Sta + ford Hill, London, N.16; AUGUSTIN GOOD, High-street, Charing, nr. Ashford, Kent; JAMES HAMILTON, 111, Hatherley-road, Fairbank, Ontario, Canada; ALFRED H. HARD-CASTLE, 22, Leeds-road, Nelson, Lancs.; ELSTON T. D'AUTE-HOOPER, 159, Gooch-street, Birmingham; ERNEST H. HOUGHTON, 43, Rye Hill Park, London, S E. 15; W. R. JENKIN, 16, Warren-street, Devomport; Miss Doris Lawley, 41, Creswell-road, Clowne, nr. Chesterfield; ROBERTO MARAURY, 8, Str. Domingo, Huesca, Spain; MISS D. I. PEARSON, Park Gate House, Castle Sq. Bishop Auckland, Durham; CHARLES PENGILLY. 54, Church-road, Portslade-by-Sea; GEO. L. PRATT, 170, Halley-road, Forest Gate. London, E.7; MISS LUCY E. RICHARDS, Cliffe Villa, Warwick-road, New Barnet, Herts; WILLIAM RIDDICK, Bath-road, Melksham, Wilts; WILLIAM KEEST ROBINSON, 43. Trewsbury-road, Sydenham, London, S.E.: ROBEKT Ross, 3, Portland Terrace, Troon, Ayrs; GUY M. SENIOR, 100, Oxford-street, Sheffield; WALTER SEVERN, 8, Comer-road, Worcester; MISS E. E. N. STRACHAN, 210, Mance-street, Montreal, Canada; HAROLD A. TOWERS, " The Hollies," Crick, nr. Rugby; EDWIN F. TURNER, 136, Abbeville-road, London, S. W.4; JOSEPH VAUGHAN, 68, Manchester-street, Oldham; ARCHIE WM. WALSH, 112, Osborneterrace, Darwen; MISS JESSIE WARBRICK, 26, Westminster-road, Kirkdale, Liverpool; DOUGLAS TREVENA WILLSTEED, 60, Wharfedale Gans, Thornton Heath, Surrey; C. E. Clarke, Welham, nr. Ketford, Notts; EDWARD PORTER COWAN, 5, Uval House, Brix on Oval, London, S. W.2; F. CRESSWHIL, 3. Carlton-square. Globe-road, E.1; AD. DORLENCOURT, 14. York Villas, Brighton; JOSEPH FISHER, 123, Holmhirst-ond, Woodseats, Sheffield; MISS KATE HANCOCK, 58, Goldstone Villas, Hove, Sussex; John Henry Holmes, 28, Sycamore Avenue, Bingley, Yorks; Miss Elizabeth B. Ireland, 13, Eaton-road, Hove, Sussex; J. M. Marsden, 11, Hill-street, Blackburn, Lancs; Miss Dora E. Parsonage, 14, Bewsey-road, Warrington; MRS. L. PAVNE, 31, Lancaster-road, Brighton; GEORGE Scott, Donaldson's Hospital, Edinburgh; Joseph P. Swan, 12, Blucher street, Waterloo, Liverpool; PIERRE BRANCHU, Mencton-Salon-Cher, France.

CORECTION TO PREVIOUS LIST.
HENRY T. WHITE should be HENRY T. WINTER.

NEW FELLOW.

MISS CONSTANCE M. M. OGSTON, Woodside, Aberdeenshire.

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION

*MISS JANE S. B. KING, Golders Green, London, N.W.4; Mrs.

M. GOODALL, Highbury, London, N.; *MISS M. E. PEET, Birkenhead; *MISS A. HOGG, Chester; *MISS BESSIE BALDWIN, Lambeth,

PASSED ADVANCED EXAMINATION.

MARK STARR, Labour College, Earls Court, London, S. W.5.

* Denotes that the candidate has passed with distinction.

Council Meeting, B.E.A.

Held at the offices of the Association on Monday, 15th December at 6.30, with Mr. G. J. Cox in the chair. The following were present:—Miss Blake, Miss O'Brien, Miss Schefer, Messrs. Bredall, Edmonds, Fairman, Long, Scott-Monteth, Robertson, Sexton, Sharp.

Among the items discussed were:

Extraordinary General Meeting.—A requisition signed by sixteen corporate members for an Extraordinary General Meeting to consider proposed changes in the Articles of Association having been received: it was moved, seconded and carried, "That the Extraordinary General Meeting be called for the third of April, and that notice of the Meeting be posted to every Member with the March Journal."

Revision of Articles.—It was moved, seconded, and carried, "That a Committee be appointed to consider the revision of the Articles of Association of the British Esperanto Association (Incd.) and of the Bye-laws appended thereto, and to report to the Council at an early date"; also "That the nomination of the members of

this Committee be left till January 12."

Notice is hereby given that the next meeting of Council will be held on Monday, January 12, at 6.30 in the Offices of the Association, 17, Hart-street, London, W.C.1, and the following Meeting on Monday, February 16, at the same place and time.

AGENDA.

Financial Statement.

Motion by Mr. Edmonds as announced in B.E. for

December, 1919, p. 104.

Nomination of Members of Committee for consideration of Articles of Association and Bye-Laws.

Correspondence and other business.

* * * *

Nomination of Councillors, 1920-21.

The Members and Fellows of the Association are reminded that they have the right to nominate candidates for electon as Officers and Council for the ensuing year.

Members and Fellows who desire to avail themselves of this privilege may obtain Forms of Nomination, with the necessary Instructions, from the Secretary of the Association.

The latest date for the receipt of nominations is February 14, 1920.

M. C. BUTLER, Secretary.

* * * * *

Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

Sub tiu ĉi rubriko oni enpresas malgrandajn anoncojn de tiuj el niaj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ĉiu anoncanto devas pagi ses pencojn (25 spesdekojn) por trilinia enpresaĵo kiel sube (pli ol tri linioj po tri pencoj por ĉia komencita linio); ĉiu Membro de la Asocio havas la rajton fari unu enpresaĵon senpage. Bonvolu skribi legeble, rekte al la Redakcio.

1017. Atemaxac (Guadalajara), Mexico.—S-ro Ernesto E. Guerra, P.O.B. 5212, deziras korespondadi kun larĝanimaj kaj konstantaj geesperantistoj.

1038. New York City, Usono.—S-ro Armand B. Coigne, 2633, Creston-ave., Fordham, deziras koni gesinjorojn interesatajn en internacia asocio por psika enketado kiel helpontoj kaj avizantoj. Mi ne korespondos pri psikismo, nek pri ia temo escepte tiun asocion. P.K. kaj P.M. kolektantoj ne ricevos respondon.

1136. Lille-Fives (Nord) Francujo.—S-ro F. Lepercq, 67, rue de Lannoy, tre deziras interŝanĝi serioze poŝtmarkojn kun ĉiulandaj gesamideanoj, sed ne faras la unuan sendaĵon. Plezure korespondos letere kaj poŝtkarte kun la gesamideanoj, kiuj povas sendi poŝtmarkojn al li. Tuj kaj ĉiam respondos. (183.)

Prenzlauer Promenade 14, deziras danki britajn ges. por komplezoj ricevitaj dum militkaptiteco en Jersey. Li volas korespondi kun samideanoj interesiĝantaj pri migrado kaj kun magistrataj, policaj oficistoj. Kolektas p.m., p.k., serĉas ankaŭ gekoresp. por siaj lernantoj.

1143. Stockholm Sö. Svedujo.—S-ro Leander Tell, Prästgärdsgatan, 42, deziras korespondantojn por siaj kursanoj. Plue li deziras
kiel sekretario de la sveda Federacio por Internacia Helplingvo
Komerca (F.I.H.) komercajn interrilatojn por la asociaj membroj.

1144. Tarrasa (Barcelono) Hispanujo.—S-ro Vicente Garcia, strato Valle, 9, deziras interkorespondi kun ĉiulandaj geesperantistoj per ilustritaj poŝtkartoj kaj leteroj, precipe en la novaj rusaj ŝtatoj kaj Afriko kaj suda Ameriko. Ĉiam, ĉien kaj tuj respondos al ĉiuj.

1145. Dublin (Irlando).—S-ro J. Kripps. 39, Hardwicke Street,

deziras korespondadi per letero kaj il. p.k., kun gesinjoroj en Hinujo, Hindujo, Japanujo kaj alilandoj. Tuj kaj ĉiam respondos.

Polo, fraŭlo 30-jara, iomete bela, katoliko, ferfandisto (nur estas tute malriĉa) volas konatiĝi fraŭlinon iomete belan, kun bona koro, el kia ajn lando nur ke ŝi estas katolikino kaj havas kvankam iomete da mano por komuna mastrumo (taras ĉion sen ŝerco); necesa estas fotografaĵo. Atendas respondon.

1147. Eisenach (Germanujo).—Policanoj, membroj de la Esper. Policistoj grupo Eisenach, Georgenstrasse 6, deziras korespondi kun

anglaj policanoj.